

Edmond Privat kaj Romain Rolland, laŭ Pierre Hirsch
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 472, 1972.10.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Memore al la dekjara datreveno de la morto de Edmond Privat Pierre Hirsch verkis por la revuo *Svisa Espero* interesan artikolon pri la amikeco, kiu ligis Edmond Privat al Romain Rolland, grava franca verkisto. Ni citos kelkajn erojn el tiu artikolo.

A.- « *La unua letero de Romain Rolland al Edmond Privat datiĝas de la 26-a de februaro 1915. La aŭtoro de la romano Jean-Christophe tiam laboris memvole ĉe la Oficejo por Militkaptitoj de la Ruĝa Kruco en Ĝenevo. Unu el liaj amikoj, profesoro Paul Seippel, iam montris al li leteron de Edmond Privat, ĵurnalisto de la gazeto **Le Temps** en Parizo. La juna sviso atentigis Paul Seippel pri la eksterordinara disefiko de la artikolo **Super la batalo** en la popolaj medioj de Parizo. Romain Rolland skribis al Privat por lin danki. Post nelonge, Edmond Privat vizitis Romain Rolland ĉe la Oficejo por Militkaptitoj, kaj prezentis al li sian intiman amikon kaj samideanon Hector Hodler.*

Cl.- *Ekde 1915 sufiĉe regula korespondado estiĝis inter la franca verkisto kaj la svisa ĵurnalisto, baldaŭ mem iĝonta aŭtoro de verkoj. Tiu korespondado daŭros ĝis la teruraj jaroj de la dua Mondmilito, malgraŭ la malfacilaĵoj de interkomuniko. La morto de Romain Rolland, en decembro 1944, do metis finon al ĝi.*

A.- *Kiam Edmond Privat publikigis en 1918 sian gravan verkon **L'Europe et l'Odyssée de la Pologne au XIXe siècle** [Eŭropo kaj la eventoplana historio de Pollando en la 19-a jarcento], Romain Rolland notis en sia **Taglibro**, ke li legis tiun libron « kun forta emocio », kaj la 28-an de januaro 1919 li skribis al ĝia aŭtoro longan leteron, el kiu ni eltiras jenan frazon :*

Cl.- « *Kia terura travivaĵo ! – Kaj la plej terura estas ke, tiel proksima al ni, ĝi estas nekonata de la plimulto aŭ (eĉ pli malbone) forgesita. »*

A.- *En 1920 Edmond Privat publikigis sian gravan verkon **Vivo de Zamenhof**. Li kompreneble ĝin sendis al Romain Rolland, kiu ĝin legis en esperanto kaj adresis al li jenan leteron, kiun ni tradukas :*

Cl.- « *Kara Sinjoro Edmond Privat, koran dankon pro via **Vivo de Zamenhof** kaj pro la amikaj vortoj, kiuj ĝin akompanas. Kiom mi estas dezirinta koni tiun bonan magiiston, kiu venis por redoni al la konstruintoj de la Babela Turo la unuecon de ilia perdita lingvo – tiun grandan revoluciulon, kiu evitis perforton por starigi novan aferstaton! Almenaŭ mi nun lin vidas tra viaj okuloj! Sed vi ne devas – ho ve! – fari al mi nemeritajn komplimentojn. Mi povis konscii pri la harmonio de Esperanto kaj pri la genio de ĝia kreinto, sed mi ne parolas lian lingvon. Mi ankoraŭ apartenas al la maljuna stulta franca generacio, kiu tiel malvolonte lernas alian lingvon, ol la propran. Mia pigremo sukcesis nur legi du aŭ tri. Sed neniun alian mi skribas – ol tiun de mia avo Colas Breugnon. Tre kore via Romain Rolland. »*

A.- *En 1928 Edmond Privat, trolacigita kaj malsana, devis decidi forlasi Ĝenevon por liberiĝi de tro multaj okupoj. Li elektis restadejon en Veytaux, tute proksime al Villeneuve, kie loĝis Romain Rolland kaj ties fratino Madeleine. Simile al Romain Rolland, Edmond Privat pasie fervoradis por Gandhi, neperforto, kaj la lukto de Hindio por ties sendependiĝo.*

Cl.- *Gandhi venis al Eŭropo en 1931 por ĉeesti la Konferencon de la Ronda Tablo en Londono. Revene de Anglujo en decembro 1931 li deziris viziti sian biografon Romain Rolland en Villeneuve. Tiukaze Edmond Privat ludis tre gravan rolon organizante kaj tradukante la prelegojn de Gandhi en Lausanne kaj Ĝenevo, kaj poste akompanante Mahatmon Gandhi kun sia edzino Yvonne Privat-Bouvier en Italujon kaj poste en Hindion. Li informis rekte Romain Rolland pri la hinda movado de ne-kunlaboro kaj pri la aresto de Gandhi.*

A.- *Dum la somero 1932 Romain Rolland dediĉis grandan parton de sia aktiveco al la preparado de Tutmonda Kongreso kontraŭ la Milito, kiu okazis en Amsterdamo. [...] Multaj svisaj gazetoj tiam akre atakis Romain Rolland. Lin defendis Edmond Privat en artikolo titolita « La svisa gastamo, Romain Rolland kontraŭ la milito. », kiu aperis en la gazeto **La Sentinelle** la 8-an de junio 1932. Jen ero el ĝia konkludo :*

Cl.- *« Por esti bonvena gasto [en Svislando], necesas esti fremdulo kovrita de ordenaj dekoraj, flatanto al la potenculoj de la mondo kaj neniel simila al Jean-Jacques Rousseau, kiun niaj gazetistaĉoj ĵaluze persekutis, se li estus ilia samtempo. Hodiaŭ ili plektas al li laŭdojn, nur ĉar li mortis antaŭ 150 jaroj. Iliaj prauloj bruligis liajn verkojn. [...] Iliaj nepoj omaĝe metos marmorajn tabulojn sur ĉiun domon iam loĝatan de Romain Rolland. Ekzistas feliĉe multaj svisoj, kiuj preferas lin ami dum li vivas. En la lando de la Ruĝa Kruco ili ne forgesas lian alvokon al humaneco, kiam la mondo sinkis en barbarecon. »*

A.- *Se vi deziras legi tiun interesan artikolon pri Edmond Privat kaj Romain Rolland, skribu al Svisa Radio petante la sendadon de la koncerna numero de Svisa Espero.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!*